# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k72.html

## Eksterordinara numero




Nro 72a Oktobro/Decembro de 2006

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez.**

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marina Española, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

**ISSN 1697-6460**

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Manuel Pankorbo,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Petras Ĉielauskas,
9 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
10 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
11 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
12 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.

**Kovrilo**: Ĉi tiu numero dediĉiĝas al la Muzeo de Esperanto, kiu estas en urbeto Sankta Paŭlo de Ordal, proksime de Barselono, Hispanio.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*




*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***konto*** *nº* ***2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 10 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

Redaktore

# Muzeo de Esperanto

Antaŭ kelkaj monatoj mi telefonis S-inon Teresa Massana Rafols, vidvino de samideano Ludoviko Hernández Yzal, por viziti la Muzeon, kiun ŝia edzo fondis kaj subtenis dum la lastaj jaroj de sia vivo. Mi memoras, ke en kongreso hispana de Esperanto, antaŭ kelkaj jaroj, Ludoviko mem demandis min ekzempleron de ***Kajeroj el la Sudo*** por konservi en sia Muzeo, kiun li invitis min viziti iam, kiam mi volos, en Sat Pau d'Ordall, en la provinco Barselono. Tio estis mia ekkono pri tio, ke tiu muzeo ekzistis. Muzeo de Esperanto! Kion oni povus konservi tie? Nu, vere objektoj, aferoj rilatantaj al Esperanto. Oni povas vidi tie ĉiajn stelojn, eĉ tiujn, kiujn kelkaj ardaj esperantistoj uzis kiel mono iam. Ankaŭ estas ŝtampoj el multaj landoj, kiuj rilatas al Esperanto. Kaj fotojn, multe da fotojn, pri la fondinto de Esperanto kaj elstaraj esperantistoj de ĉiu tempo kaj lando.

Mi Vizitis Katalunion dum lasta Pasko, do mi memoris pri la Muzeo, kaj petis S-inon Teresa Massana vidi ĝin. Ŝi afable prezentis al mi la muzeon kaj ĉiun eron, kiun mi fotis celante prezenti ilin al vi, leganto.

Tiu ĉi estu la delonge atendata numero de ***Kajeroj el la Sudo***. Ĝi estu speciala kajero, la kajero kiu enhavas la grandan trezoron de nia movado, la Muzeon de Esperanto. Granda monumento honore al sia fondinto, Ludoviko Hernández Yzal, el Barselono. Ni sekvu Teresan, kiu malfermas la pordon por ni.






**Protektantino de Esperanto, laŭ Teresa. estas la Virgulino de la Espero. Oni povas vidi ĝin apud la eniro.**



Fama foto de iniciatinto de Esperanto dum la Kongreso de 1909, en Barselono.



La kvina Kongreso.



BAZAR ESPERANTISTA
D-ro L. L. ZAMENHOF
AŬTORO DE LA LINGVO ESPERANTO
LANCERIA
ENCAJES
BISUTERIA
BORDADOS
MANTELERIA
PERFUMERIA
PELETERIA
SOMBRILLAS
PARAGUAS
BASTONES
CORBATERIA
PAÑOLERIA
GUANTERIA
SUCURSAL
DE
BENITEZ y C.a
TRAFALGAR 2
y
JUNQUERAS 18
BARCELONA




CIUJ LANDOJ UNU LINGUO
INTERNACIA ESPERANTO LINGVO
ESPERANTO
ESPERANTO LINGVO INTERNACIA
UEA
SAT ESPERANTO
BEA 1907-1967
SIA


HISPANA
ESPERANTO MUZEO
ESPERANTO




1913 – 1958
ESPERANTO FAKO DE
S.C. "JUVENTUD TARRASENSE"
HAVAS LA HONORON ELEKTI VIN
S-RON SEBASTIÀ CHALÈR ARNAU
KIEL HONORAN PREZIDANTON DE NIA
ESPERANTISTA GRUPO MODESTA SED
ELKORA PREMIO POR VIA SENĈESA KAJ
KONSTANTA PENADO POR LA PROPAGANDO
KAJ INSTRUO DE ESPERANTO EN NIA
URBO DUM PLI OL KVARDEKKVIN JAROJ
LONGE VIVU NIA SAMIDEANO


41-A IFEF-KONGRESO
SALOU
13.-19.5.89
ESPAÑA
HOROJ


SPECIALA PREMIO "KLARA SILBERNIK"
okaze de la 78-a Universala Kongreso de Esperanto
Valencio 1993
AL Sinjorino Maria Teresa Massana de Yzal
Kiel rekono de ŝia nesuperebla apogo al Esperanto,
en perfekta kunlaboro kun ŝia edzo, Ludoviko,
DE la pasintjaraj premiitoj



Fondinto de la Muzeo, Ludoviko Hernández Yzal.


XIª HISPANA
KONGRESO DE
ESPERANTO
BARCELONA
1936


LA NOBLA KORANO


Internacia Centro "Interŝanĝoj kaj Renkontoj"
FOIRO
DE MILANO
14an-23an de aprilo 1981
ESPERANTA SEKCIO DE
GUOZI SHUDIAN
Distribuas al ĉiulandaj esperantistoj kaj Esperantaj asocioj jenajn:
* la ilustrita monata Esperanta gazeto de Ĉinio


55ª UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO
1.-8. aŭgusto 1970 en Wien


XVI CONGRES CATALA
D'ESPERANTO al Vendrell
Dies 4. 5 i 6 Juny 1933
Organitzat per la
FEDERACIO ESPERANTISTA CATALANA
Jocs Florals Internacionals
Exposició Esperantista - Conferències
ASSEMBLEA de la K. E. F.
Excursions a Poblet i Santes Creus
Diversos actes en honor dels
esperantistes


DOKTORO L.L
ZAMENHOF
ESPERANTO


16ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
23-27 JULIO 1955
GIJON
15ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
14ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
BILBA
7-8-9-10 AUGUST
13ª HISPANA KONGRESO ESPERANTO
VALENCIA
26-27-28-29 JULIO 1952
12ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
XI HISPANA ESPERANTO-KONGRESO
LA MASTRO DE L' RINGOJ (1)





Sed la vera trezoro ĉe ĉi tiu muzeo estas librara kaj gazetoteka: tie troviĝas la plej granda kolekto da magazinoj esperantaj, kiun mi iam vidis. Certe tiu ĉi loko estas Meko por fakulo pri nia afero.




Apude al la librošrankoj oni tajpis la nomojn de elstaraj esperantistoj, kiuj vizitis la Muzeon aŭ kiujn la muzeistoj deziris honori.




*Denove fermita, la muzeo atendas novan vizitanton. Ĉu eble vi, leganto?*

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPRANTISTAJ (HALE)**


REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO** Tfn° (00 34) 615 427 143

**Retskribu al jesuo@ono.com**


http://213.172.47.3/gazetoteko/kajeroj/k72.html

http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k72.html





**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.**

**ISSN 1697-6460**